

## & Deziro de grandveziro:

< Rekante 19 el 37 batoj por strofo, entute 333 paŝoj dum 4 minutoj. Turkan fabelon poemigis Julio Baghy (Ĉielarko, 1966). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:37> (

o;do /soso sola sofa mi do;do rere mire do do;do LaLa dodo TiLa La So;So dore mire do do;do

(#Rekantaĵe: soso sola sofa mi do;do re mire do; dodo La do TiLa So o;So dore mire doTi do)

)×9 )+

### (&Strofoj:

#### ,&1:

'1 Dum /konsiliĝo en divano ; ekstaris grandveziro: ; "Indulge donu, ho sultano, ; permeson por foriro! .....

(×:; **En danco paŝas ni kun ĝojo ; dum ruĝas la flor' ; venos falĉa ĝia hor' ; kaj for koloro kaj dolor'.**)

'2 Rigardu tien, en angulo ; kun glavo negro staras; mi sentas, tiu maliculo ; min buĉi sin preparas. ....

'3 Ekster muroj de Bagdado ; distanco estus ŝirmo; ordonu al mi por agado ; en fora urbo, Smirno!" .....

#### ,&2:

'4 La suvereno en angulon ; rigardis tuj defie, ; sed li ne vidis la fremdulon. ; Neniu staris tie. ....

'5 "Vi, grandveziro, estas laca ; post longa tempo serva; vi indas do por vivo paca ; en Smirno malpli verva". .....

'6 Sed post foriro tuj klariĝis, ; ĉe vid' li ne eraris, ; ĉar en angulo videbliĝis: ; kun glavo negro staris. ....

#### ,&3:

'7 "Kiel ci venis, hej, pagano, ; tra gardo de l' eskorto?!" ; "Mi estas, sciu, ho sultano, ; anĝelo de la Morto". .....

'8 "Ĉu venis ci por min ekbuĉi ; aŭ mian grandveziron? ; Mi pretas, sed li por rifuĝi ; al Smirno prenas iron". .....

'9 "Lin trovi tie ĉi, mi miris; Bagdad' ja estas ŝirmo. ; Al mi ordone Allah diris: ; mortigu lin – en Smirno!" .....